

Saluton!

Jubilea numero, seninterrompa apero dum 50 vicaj monatoj

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№1, Januaro, 2009

Kara Leganto! Feliĉan, prosperan, sanan kaj fruktodonan Novan 2009 jaron, al ĉiuj!!! Hodiaŭ mi ne skribos al vi pli multe, ol kutime, hodiaŭ, salutante la senĉesan ĉiumonatan aperon de 50-a numero de nia bulteno, parolos niaj gastoj, amikoj, partneroj... Via Araneo

Salutmesaĝoj

Sur la sojlo de la nova jaro, 2009

Karaj legantoj de la bulteno de la Esperanto-societo en Ŝikago, okaze de via 50-a numero mi rediras tion, kion mi diris jam pli frue: Esperanto estas io amerika pli ol io eŭropa, kaj ĝi venkos en Ameriko aŭ tute ne venkos. Esperanto estas nova ilo por nova mondo kontraŭ ĉiuj tradicioj kaj hereditaj situacioj, kaj kie, se ne en Ameriko, oni povas ŝati tiajn valorojn? Estas vero, ke nuntempe la ekonomia krizo komenciĝinta en Usono estas en la centro de ĉies atento, sed, rigardu tion, kio estas okazanta: Usono unue estis batita de la krizo tre forte kaj Usono jam reagis dum en aliaj landoj oni ankoraŭ estas demandanta sin ĝis kiu punkto temas pri vera krizo. Do, mia bondeziro estas ke vi en Ŝikago laboru ĉiam pli intense por Esperanto, ĉar ĉio, kio okazas ĉe vi hodiaŭ, morgaŭ okazos en Parizo, Madrido kaj Romo. Do, via laboro por Esperanto havas pli grandan efikon ol vi mem imagas. Feliĉan jubileon!



Renato Corsetti, prezidinto de UEA

SALUTVORTOJ DE E-USA PREZIDANTO



Dear Wonderful People, la samideanoj en Ŝikago! Nome de Esperanto-USA ni gratulas vin okaze de Kristnasko kaj Novjaro! Estu 2009 sukcesa por vi, donacu al vi sanon, prosperon kaj multajn interesajn numerojn de via enhavriĉa bulteno SALUTON! "Kaj la Vorto fariĝis karno kaj

loĝis inter ni, kaj ni vidis Lian gloron, gloron kvazaŭ de la sole naskita de la Patro, plena de graco kaj vero." Sankta Johano 1:14 Amike kaj elkore,



Filipo (prez. De E-USA) kaj Elizabeto Dorcas

SALUTO EL VATIKANO

Benedikto la XVI-a ĉi-jare daŭrigis la tradicion kaj inter alilingvaj bondeziroj eldiris siajn kristnaskajn kaj novjarajn salutvortojn ankaŭ en Esperanto. Kiel kutime, en la popolamaso en Vatikano ĉeestis esperantistoj, kiuj levis ŝildon kun la vorto "Esperanto" kiam aŭdiĝis la esperantlingva saluto "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!" La ŝildo bone videblis en la rekta televida elsendo, sed la itala televido spite tion mise asertis, ke temis pri saluto en la indonezia lingvo. La teksto "saluto en Esperanto" aperis sur la televidekrano nur kiam la papo jam parolis latine



ZMENHOFA BANKEDO

Dimanĉe la 14an de Decembro 2008 okazis la tradicia Zamenhofa Bankedo, organizata ĉiujare de La E-Societo de Ŝikago. Ĉi foje ni renkontiĝis en la taja restoracio "Golden Thai" en la Itala Vilaĝo de Ĉikago. En bele orientstile kaj kristnasketose ornamita salono ariĝis dekdu esperantistoj, inkluzive gastojn de la najbaraj ŝtatoj: Viskonsino kaj Indianao. La partoprenantoj gustumis tajajn antaŭmanĝojn, supojn, specialaĵojn kaj dolĉaĵojn. Pluraj el ni lerte uzis la manĝobastonetojn.



Ĉiujn salutis la prez. Viktoro Pajuk, antaŭ sia frua foriro pro la profesiaj kaŭzoj. Sekve prezidis D-ro Les Kordylewski, kiu prezentis mallongan enkondukparolon. Li tostis la 149an naskiĝdatrevenon de nia Majstro, D-ro Esperanto, L. Zamenhof, kaj esprimis kontenton ke E-o delonge funkcias en Ŝikago – la usona urbego fama pro sia multetna loĝantaro. Roĝero Blaine rakontis interese kaj vigle pri siaj vojaĝoj tra Rusio kaj Baltaj Landoj kaj prezentis la vojaĝfotojn. Fine Byron Eiguren gitarludis multajn internaciajn melodiojn. Ĉiuj ĝuis la agrablan kaj festan etoson.

Les' Kordylewski

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

27an de Januaro – Henry Dunant, samtempulo de L. Zamenhof

24an de Februaro – Centjariĝo de E-eldonado en Ŝikago

...28an de Junio – tradicia pikniko

